# NORDA GAZETO

DUMONATA BULTENO
DE LA
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Redaktoro kaj responda eldonanto :
Lucien BOURGOIS,
21, Rue Gambetta,
NOYELLES-GODAULT (P.-de-C.).
Ĉiun presigotan materialon
oni sendu al la ĉisupra adreso.

Kotizoj (kun bulteno)
a) Junuloj : 2 Fr.
b) Aktiva membreco : 3 Fr.
c) Subtenanto : 5 Fr.
pagendaj al C.C.P. LILLE 517-15
Fédération Espérantiste du Nord,
17, Rue des Bouvreuils, ARRAS (P.-de-C.).

Ĝenerala Sekretario : Fernand DITACROUTE, 178, Chemin Castre, CALAIS (P.-de-C.).

---

Informilo n° 6 Novembro-Decembro 1963


## PLENA SUKCESO DE NIA FEDERACIA RENKONTIĜO EN TOURCOING

En la Kultura Centro de Tourcoing, la dimanĉon 13-an de Oktobro, ĉeestis proks. 70 ges-anoj. Partopreno ankoraŭ pli kontentiga ol kutime, komparebla kun la kongreso de Valenciennes. Senkulpiĝis S-roj PHILIPPE, DUMARQUEZ, Ges-roj BOUQUIN k SKOLE.

S-ro Marcel DELCOURT malfermis la kunsidon. Li salutis la partoprenantojn k aldiris : "Neniam, mi vidis tiom da ges-anoj en nia urbo".

Nia Federacia Prezidanto, S-ro ODENT, poste prenis la parolvicon. Unue, li esprimis dankemon al S-ro DELCOURT pro la laborego, kiun li plenumis dum la lastaj monatoj por efektivigi sian gravan - k sukcesan - ekspozicion k ankaŭ nian federacian renkontiĝon. Li klarigis poste la kialon de la departementaj sekcioj (aperis en la bulteno(julio-aŭgusto) la nomoj de la 3 sekretarioj) laŭ la plano de U.F.E., kiu deziras, ke en la estonto, la departementoj havu siajn proprajn estrarojn.

Rememorigante la sugeston faritan de S-ro LACZYNSKI dum nia kongreso en Valenciennes, pri intergrupaj kontaktoj, S-ro ODENT proponis, ke oni apliku tiun ideon dum la venontaj longaj vintraj vesperoj. Li invitis la grupajn respondeculojn kontakti najbarajn grupojn por realigi tiajn amikajn renkontiĝojn.

S-ro LENEL proponis sian loĝurbon HAZEBROUCK, kiel lokon de proks. renkontiĝo.

Nia Prezidanto denove memorigis pri la ekzisto de la <u>federacia biblioteko.</u> Bonajn librojn niaj membroj povas legi dum la vintraj vesperoj, SENPAGE. Nova k kompleta listo aperos en la Bulteno.

Antaŭ ol fini, S-ro ODENT aldonis kelkajn vortojn pri la komunaj tagmanĝoj de niaj renkontiĝoj. Poste venis la parolvico de niaj eksterlandaj amikoj. Salutis la ĉeestantojn S-ano BEN WEBER, el Middelburg, kun sia kutima vervo, S-ro GALLEZ, el Hensies k S-ro DEBROUWERE el Courtrai.
(Lastomemente ankaŭ alvenis du valonaj esperantistoj).

S-ro DITACROUTE, Ĝenerala Sekretario, mallonge parolis pro la malfrua horo. Nome de la federacianoj, li gratulis sian antaŭulon; S-ro BOURGOIS, pro lia senlaca sindonemo kiel Sekretario.
Li sciigis, ke la 3-a Konfederacia Kongreso okazos en Kalezo, je dato ne ankoraŭ difinita, sed verŝajne je PASKO.

Poste, S-ro GILOTEAUX ĉefe parolis pri la solena inaŭguro de la Ekspozicio en la Urbdomo de Tourcoing.
Ĉ. la II-a, la kongresanoj forlasis la laborkunsidejon por veturi al la Urbdomo, kie la Vicurbestro, S-ro HOUDART, kune kun magistratanoj akceptis ilin, nome de la urbestro, S-ro LECOCQ. Laŭ la tradicio, honorvino fermis tiun oficialan ceremonieton antaŭ la vizito de la impona ekspozicio, kiu verdire ampleksis esperantistan muzeeton.

Je la 13-a, amika bankedo arigis ĉiujn en la Stacidomo Bufedo k S-ro HOUDART partoprenis la bonhumoron; li montris, ke li estas sperta kantisto. Antaŭ ol adiaŭi la kunmanĝantaron, li eldiris, ke li konservos neforgeseblan memoron, pri la agrabla tempo pasigita inter ni.
Je la 15-a okazis bela senpaga loterio. Multnombrajn lotojn kolektis Ges-roj GILOTEAUX, inter kiuj, tiujn de la regionaj gazetoj NORD-ECLAIR, NORD MATIN k LA VOIX DU NORD.

Tiu tro rapide forpasita tago finiĝis per vizito de la fama Sonorilturo.

Ni petas la organizintojn : S-roj M. DELCOURT k filo, Ges-roj GILOTEAUX k la malavarajn donacintojn, ne forgesante NORD-ECLAIR, NORD-MATIN k LA VOIX DU NORD, akcepti la esprimon de niaj plej sinceraj danko k gratulo.
Rendevuo en CALAIS - verŝajne je Pasko - por la 3-a Konfederacia Kongreso k ĉe la komerca Foiro en LILLE dum Aprilo.

Fernand DITACROUTE.

---

Kalendaro de la Esperanto-kongresoj 1964.

| | | |
|---|---|---|
| Je Pasko (fine de marto) | : | 3-a Trilanda Konfederacia Kongreso en Kalezo |
| En Aprilo (dato fiksota) | : | Renkontiĝo de la Nordfranca E-Federacio en Lille |
| 9 - 15 Majo | : | Fervojista Kongreso en Bruselo k Antverpeno.<br>Informejo : Esperanto, BEFA, Gare Centrale, BRUXELLES I |
| 15 - 18 Majo | : | Nacia Kongreso de la Belga Ligo en LIEGE. |
| " | | Nacia UFE-Kongreso en Parizo. |
| 1 - 8 Aŭgusto | : | Universala Kongreso de Esperanto en Hago (Nederlando) |

Informojn pri la du ĉisupraj kongresoj havigas kontraŭ reafranko :
UFE, 34, Rue de Chabrol, PARIS (10).

Jam de nun, rezervu viajn proksimjarajn feriojn por la Esperantista Kulturdomo, la Kastelo Grésillon en BAUGE (Maine-et-Loire).
Restadoj de Aprilo ĝis fine de septembro.
Informojn k aliĝojn prizorgas : MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE,
CHATEAU DE GRESILLON, BAUGE (M.-et-L.).

Tradukemuloj! Aliĝu al "Moreto" (Mondanista Reto de Esperanta Tradukado). Petu senpagan dokumentaron de : I.R.C.M., 55, Rue Lacépède, PARIS (5°).

## NIA VIVO

Hénin-Liétard (P.-de-C.).- Marde, 15-an de oktobro, malfermiĝis du E-kursoj de la Laika Hejmo, Place Carnot, sub gvidado de Lucien BOURGOIS.

La komitato de la Laika Amikaro decidis denove atribui al la loka rondeto jaran subvencion de 150 Fr.

Roubaix (Nord).- F-ino DEGAND parolis pri E-o k prezentis filmon pri Baugé ĉe la loka junularklubo. Okazis vigla debato kun partopreno de S-ro KOĈVARA. Interpretis S-ro GILOTEAUX.

Tourcoing (Nord).- S-ro BOUQUIN eldiris la festparoladon, okaze de la oficiala inaŭguro de la E-ekspozicio aranĝita de S-ro DELCOURT.

S-ro PHILIPPE, Honorprezidanto de UFE, ĉeestis la ceremonion.

La regiona televido, radio-intervjuo kun S-roj DELCOURT k BEN WEBER, 20 gazetartikoloj raportis pri la landlima renkontiĝo k tiu grava ekspozicio, kiu prezentis dokumentojn el 85 landoj. Vizitantoj : 1.000 (publiko) + 100 (esperantistoj).

Unuaj konkretaj rezultoj : E-sekcio ĉe la urba biblioteko, senpaga disponigo de kunvenejo por la loka rondeto, adreso de la UEA-delegito en la nova turisma faldfolio, ĉiusemajnaj artikoloj en la tri ĵurnaloj, debatoj pri E-o ĉe diversaj asocioj.

Esperantisto ĉeestis debaton kun partopreno de 4 neesperantistaj sovetaj gastoj.

Valenciennes (Nord).- Merkredon, 8-an de oktobro, malfermiĝis du E-kursoj (unuagrada k duagrada) en la porknaba kolegio "Ecole du Cariot".

Ambaŭ kursojn gvidas S-ro LIGOT.

### Vizito de eminentaj eksterlandanoj

Fine de oktobro, S-ro Drahomir KOĈVARA, komitatano de la tutlanda ĉekoslovaka E-Asocio k Prezidanto de la E-klubo ĉe Uzinoj VITKOVICKE-ZELEZARNY en Ostrava, gastis ĉe Ges-roj GILOTEAUX k CURNELLE.

Post vizito de metilernejo, li renkontiĝis kun membroj de Lille-Esperanto antaŭ ol viziti S-ron BOURGOIS en Noyelles-Godault, en ĉeesto de kelkaj membroj de la loka rondeto. Li priparolis la diversajn aspektojn de la vivkondiĉoj en sia lando.

La 2-an k 3-an de novembro, vizitis la klubon de Roubaix-Tourcoing S-ro FIGHIERA (Italo), eks-Konstanta Kongressekretario de la Universala E-kongresoj de UEA k lia edzino, S-ino Ada FIGHIERA-SIKORSKA, kunlaborintino de la ĉiutagaj E-radioelsendoj ĉe Radio Varsovio, nuna redaktorino de "Heroldo de Esperanto".

### TRADUKKONKURSO :

La elekteblaj temoj estas : "Miaj ferioj en Esperantujo" aŭ "La plej bona libro, kiun mi legis en Esperanto". S-ro BEN WEBER, el Middelburg (Nederlando) malavare donacis du belajn E-librojn por rekompenci la laŭreatojn. La kontribuaĵoj estas sendendaj al :

Lucien GILOTEAUX, 7, rue St-Saëns, WATTRELOS (Nord).

Kongresa foto 12 x 18 cm, sur la urbdoma perono en Tourcoing estas havebla ĉe S-ro GILOTEAUX (vd. ĉisupran adreson) pĉk. LILLE 2269-89.

Prezo : 2,25 Fr. (afrankite).

Tra la gazetaro :

La poemo de nia amiko Guy AUGUEZ : "Etre Espérantiste" aperis en "Le Courrier du Valenciennois" (N° 648 - 29/6/63).

La duonmonata faka ĵurnalo "L'Auto-Journal" aperigis en sia n° 334, de la 3.10.63, artikolon pri la lingvaj problemoj, verkitan de S-ro Jean-Marie THOMAS k titolitan : "Une bataille invisible".

Supre de la paĝo estas granda foto pri Esperanto kun simpatia klarigo.

Ni invitas vin aĉeti tiun ĵurnalon, ĝin legigi al viaj konatuloj k skribi gratulleteron al la ĉefredaktoro :

S-ro Gilles GUERITHAULT, Directeur de la Rédaction "L'Auto-Journal",
43, Boulevard Barbès, PARIS (18°).

Artikolo pri la nuna Babelismo ankaŭ aperis en "Réalités", n° 213 (oktobro 63).

La fama vortaro "PETIT LAROUSSE" enhavas en sia nova eldono (1964) pli detalriĉajn difinojn pri Esperanto, Espérantiste, k D-ro ZAMENHOF.

"Journal du Dimanche" (29.9.63) titolas jene :

"Ĉesigo de instruado de fremdaj lingvoj, (escepte la anglan) en la liceoj de la "Araba Unuigita Respubliko".

Kairo - 29.9.63 (AFP). La supera konsilio pri instruado decidis ĉesigi la instruadon de fremdaj lingvoj, escepte la anglan...

NDLR : Kion pensas pri tio niaj ĉampionoj pri universaleco de la franca lingvo ?

<u>GRAVE</u> : La programa direktoro de la Franca Radio intencas ĉesigi la esperanto-kurson, kiu okazis ĉiuĵaŭde, de 8.35 h ĝis 8.45 h.

Ni urĝe alvokas ĉiujn niajn membrojn, ke ili skribu protestan leteron al la Ĝenerala Direktoro : S-ro BORDAZ, 116, Quai de Passy, PARIS (16°).

Tiu letero devas resti <u>ĝentiltona</u>, tamen firma.

Ĉefe argumentu, ke ĉi tiu kurso estas tre utila por multaj alilandanoj, kiuj per ĝi perfektigas sin en la franca lingvo. Krome, estus ankaŭ oportune aperigi en la rubrikoj de la lokaj k fakaj gazetoj franclingvaj ian leteron de leganto pri tiu sama temo.

<u>Celebrado de la 15-jara datreveno de la Universala Deklaracio.</u>

Ĉiu loka grupo estas petata :

1e/ dediĉi apartan atenton al la Deklaracio dum unu el la kunsidoj aŭ kunvenoj en decembro, kiel eble plej proksime al la 10-a de decembro;
2e/ distribui esperantlingvan tekston de la Universala Deklaracio aŭ fotografaĵojn eldonitajn de UNESCO en Esperanto k havigeblajn de la C.O. de UEA (senpage);
3e/ se formiĝis loka komitato por la celebrado, nepre partopreni en ĝi;
4e/ ĉiuokaze sendi franclingve telegramon aŭ mallongan tekston al la Sekretariato de U.N. [illegible] de UNESCO kun esprimoj de bondeziroj por plua efektivigo de tiuj rajtoj en la mondo;
5e/ nepre raporti al UFE pri ĝi.

Bonvolu konformiĝi al tiu ĉi instrukcio por plifirmigi la jam bonajn rilatojn inter UEA k UNESCO.

S-ro LLECH-WALTER,
Prezidanto de UFE.

LEGEMULOJ !

Utiligu la Federacian Bibliotekon !

Kiel jam anoncite, iu ajn Federaciano rajtas prunti libron el la federacia stoko. Sufiĉas por tio, ke li / ŝi sciigu al la respondeculo, G. ODENT, 17, rue des Bouvreuils, ARRAS, (P.-de-C.) - C.C.P. LILLE 1437-63 :

1/ sian elekton (per indiko de dezirata titolo, aŭ speco)

2/ la manieron de transdono (perpoŝte aŭ okaze de fed. renkontiĝo).

Nur la afranko-kostoj estas (eventuale) repagendaj.

Ĉiun pruntopeton devas akompani subskribita deklaro, ke la libro estos tuj post uzado resendita al la bibliotekisto.

Inter la libroj, kiuj lastatempe enstokoĝis, troviĝas :

Kiel aranĝi kursojn k grupovesperojn.- Per kio amuzu nin.- La Esperanto-Klubo.- Aŭstralio.- Ifigenio en Taŭrido.- Aktualaj problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo.- Tio, kion mi kredas.- La Eta Princo (alia listo aperos en nia venonta n-ro).

JARA SUBTENKAMPANJO :

Se vi deziras disvendi loteribiletojn, mendu kajeretojn ĉe U.F.E.

Unu kajereto enhavas dek biletojn vendotajn po 1 Fr por ĉiu.

Por helpi al la financoj de la grupoj; UFE lasos al ili la duonon de la enspezo por ĉiu bileto, t.e. : 0,50 Fr.

Bv. afable resendi la nevenditajn biletojn kun la kalkuloj, plej malfrue la 15-an de februaro.

La gajnonto ricevos unusemajnan senpagan restadon en Hago.

KOTIZOJ :

1/ Federacia (vd. la frontpaĝon de nia bulteno).

2/ Union Française pour l'Espéranto :

a) kun ricevo de la revuo "Franca Esperantisto"
Membre bienfaiteur : 50 Fr., Donateur : 25 Fr., Titulaire : 15 Fr.
Junulo (18 ĝis 21 jaraj) : 8 Fr.

b) kun ricevo de la franclingva informbulteno :
Membre adhérent : 5 Fr., étudiant et jeune : 2 Fr.
Simpla abono al "Franca Esperantisto" : 10 Fr.

3/ Suplemento por Universala Esperanto-Asocio :

Membro Jarlibro (M) ricevas la UEA-jarlibron : 14 Fr.
Membro Abonanto (MA) d° + revuo "Esperanto" : 28 Fr.
Por tiuj kateforioj ĉisupraj, la junuloj pagas la duontarifon.
Ili estas petataj indiki sian naskiĝdaton.
Simpla abono al "Esperanto" :
Ĝiru la monon al U.F.E., 34, rue de Chabrol, PARIS (X°) : 21 Fr.

Ni bonvenigas jenan novan membron :
S-ro DIGUET, Telefonestro, BETHUNE (P.-de-C.).
Telefonn-ro oficeje : 104, hejle : 272

Jam ses jarojn "Nuntempa Bulgario" aperas ĉiumonate en 60 paĝoj de granda formato. Ĝiaj enhavo k eksteraĵo iĝas ĉiam pli bonaj, pli riĉaj, pli allogaj. Ĝiaj ilustraĵoj, parte multkoloraj, prezentas al vi la vivon de malgranda, sed brava, laborema, pacama k kultura popolo. La materialoj publikigitaj en la gazeto estas vera enciklopedio. Krome, oni regule donas lokon al artikoloj pri la internacia k enlanda E-movado, prilingvaj artikoloj, recenzoj pri aperintaj E-libroj, verkoj originalaj, multnombraj korespond-anoncetoj.

Abonu al "Nuntempa Bulgario", str. Levski 1, SOFIO (Bulgario).

Nia felietono : Karot:arulo - de Jules Renard - Trad. Jean Lenel.

LA PIOĈO

Frato elikso kaj Karotharulo laboras flanko ĉe flanko. Ĉiu havas pioĉon sian. Tiu de frato Felikso estis alfarita per fero ĉe la hufoforĝisto. Karotharulo nur mem faris la sian per ligno. Ili ĝardenas, multan laboron plenumas kaj arde vetrapidas. Subite en la momento de li plej neatendita (ĉiam precize en ĉi tiu momento okazas la malfeliĉoj), Karotharulo ricevas pioĉbaton meze sur la frunton.

Kelkan momenton poste, necesas transporti, singarde kuŝigi sur la liton fraton Felikso, ĵus eksvenintan ĉe la vido de la sango de sia frateto. La tuta familio tie staras sur la piedpinto kaj antaŭtime veĝemas.

- Kie estas la saloj ?

- Iom da tre freŝa akvo, mi petas, por malsekigi la tempiojn.

Karotharulo surgrimpas seĝon cele rigardi super la ŝultroj, inter la kapoj. Li havas la frunton bandaĝita per tuko jam ruĝa, kie la sango ŝvitiĝas kaj disfluas.

Sinjoro Lepik diris al li :

- Vi estas ja bele pafita!

Kaj lia fratino Ernesta, kiu bandaĝis la vundon :

- Ĝi eniris kvazaŭ en buteron.

Li ne kriis, ĉar oni lin observigis, ke tio neniel helpas.
Sed jen frato Felikso malfermanta unu okulon, poste la alian. Li havis nur por timi, kaj ĉar li grade vizaĝkoloriĝas, la maltrankvilo, la timego retiriĝas el la koroj.

- Ĉiam la sama do! diras sinjorino Lepik al Karotharulo; ĉu vi ne povis atenti, stultuleto!

---

Al sia legantaro, "Norda Gazeto" deziras agrablajn festojn.

Le Gérant responsable : Lucien BOURGOIS, 21, rue Gambetta,
NOYELLES-GODAULT (P.-de-C.).